



KURJERO

1040
1.10.1984



Redaktas

Claus Günkel
Moosweg 36
D - 5180 ESCHWEILER 4
☎ 02403 / 28951

ORGANO DE LA ESPERANTISTA RONDO AACHEN GERMANIO

KONSERVO TIUJN ĈI PROGRAMOJN ZORGE
ĈAR NI NE PLU SENDAS INDIVIDUAJN INVITILOJN ĈIUFOJE



La programo 1984 de la Esperantista Rondo Aachen

- 5.4.84 S-ino Siffrin (D)
Promenante tra la historia urbo Aachen
- 5.5.84 Trilanda Renkontiĝo en Eschweiler
(paĝoj 3-5 ; kun aliĝilo)
- 7.6.84 S-ino Sino (D)
Norda Jemeno *(la temo aliĝis)*

ferioj

- 6.9.84 F-ino Moritz (D)
Impresoj de Swanwick *(IZK 1984)*
- 4.10.84 S-ro Adriaanse (NL)
Aspektoj de sana vivo
- 8.11.84 S-ro de Laqatinerie (D)
Tradukistoj amuziĝas
- 6.12.84 Ĝenerala Jarkunveno 1984

Niaj kunvenoj ĉiufoje estas jaŭdon je la 19³⁰-a en la junulgastejo „Jugendheim Kalverbenden“ en Aachen - Burtscheid.

Ni tre kore invitas vin partopreni la kunvenojn kun ni ĉe ni inter samideanoj.
Kontakti nin bonvolu.



EGE
BONAĴ
ARANĜOJ
EN
1984 I

NE FORGESU !!!

NE FORGESU !!!

LA ADRESO POR ALIĜI:

Trilanda Renkontiĝo 84

Mercedes Moritz
Im Römerfeld 44

Telefono 02403/66888

D - 5180 ESCHWEILER 16

La programo de la Verviersa Esperanto-Grupo
por la unua duono de 1984

- 20.3.84 Georges Vanbreuse
Transdono de stultaĵoj de genera-
cio al generacio
- 3.4.84 Raymond Demarche
Valonaj legendoj
- 15.5.84 Claus Günkel
Edgar Allan Poe
- 29.5.84 Jacques Thibe
Pensado de Gaumano
- 5.6.84 Programo de la venontaj kunvenoj

Ne forgesu niajn radio-elsendojn ĉe
Radio Barcarolle FM-103" ĉiun lundon je
la 19a horo (kurso, muziko, informoj)!

Sen nia adreso:

Pl. Verte 23-Bte 3, 4800 Verviers.

La programo por la dua duono aperos nur dum
halio.

Ĝis revido !

DIRIS OVO AL OVO:



DANKON!

Per tio mi tre
kore volas dan-
ki ĉiujn, kiuj
helpis min fari
la Kurieron,
ĉu per artik-
oloj pli malpli
grandaj, ĉu
per amikaj kon-
siloj, ĉu per
alia helpo.

Claus

SEITE 6
DEUTSCHSPRACHIG



Okaze de Brusela Esperanto-kurso en la pasintjara oktobro du esperant-istinoj de la sudlimburga grupo „La Marnoland“, nome S-ino Mia Martens kaj S-ino Els Kervers-Van Tholen, gajnis vojaĝojn al Polio. Ili lasis la premiojn al iliaj gelernantoj, kiuj petis viziti la katedralon de la Nigra Madono en Czestochowa por preĝi dum la nokta meso la Preĝon Sub La Verda Standardo de D-ro Zamenhof. Oni bedaŭrinde ne povis fari tion, sed pastro, de la paroĥo en Maastricht, al kiu S-ino Martens apartenas, demandis ŝin preĝi mem. S-ino Martens do tradukis la nokto-mesan poemon kaj deklamis ĝin en la preĝejo de Maastricht Kristnasknokte kun la unua strofo de La Preĝo. Por ĉiuj estis kortuŝanta afero scii ke en la sama momento en tiom da diversaj urboj oni Esperante kaj esperante preĝas.



EUROPÄISCHE GESELLSCHAFT ZUR FÖRDERUNG SUPRANATIONALER BEZIEHUNGEN IM RHEIN-MAAS-MOSELRAUM (A E R S)

EŬROPA ASOCIO DE SUBTENO DE SUPRANACIAJ INTERRILATOJ EN LA REGIONO REJNO, MOZO KAJ MOZELO

Tio estas asocio, kiu intencas aktivigi la interkompreniĝon al niaj najbaroj en Eŭropo. Ekzemple ili aranĝas „internaciajn komfortvesperojn“ aŭ ekskursojn. Vi povas demandi pri ilia programo ĉe la ĉefsidejo de AERS. Pli da informoj vi ankaŭ povas havi de la redaktoro de la 3LK, Claus Günkel, ekz. la statuton. Demandu kaj informiĝu ĉe

A E R S

Obere Sohlstraße 12

D - 6507 INGELHEIM 1

Telefona 06132/75196

artikoletoj ajnaj

La 12an de januaro ĉijara la aŭskultaro en la junulgastejo Kalverbenden povis ekscii historiojn el la historio de Eschweiler (eŝvajler) [= frakŝenovilaĝeto]. La historio de nia ĉijara 3LR-ejo komenciĝis antaŭ 6500 jaroj dum la linear-bend-ceramika tempo kaj daŭris dum la romia erao, kiel multe da urboj en nia regiono. Dum la jarcentoj Eschweiler povis tre multajn kaj diversajn suverenojn. Tiu mezgranda urbo estas urbo de industrio, nomata la lulilo de la Rejnlanda minoekspluato. Jam en la 14a jc. la karbonomonto (Kohlberg) kun 44 tavoloj estis menciata. Eschweiler posedis unu el la unuaj vapormaŝinoj kaj estas la unua hejmo de firmoj kiel Phönix aŭ Hoesch. 1835 oni fondis la Eschweileran Ekspluatatan Asocion (EBV), kiu havis longtempo unu el la plej grandaj altfornoj. Por ega industrio Eschweiler jam 1841 ricevis stacidomon, kiu ankoraŭ hodiaŭ estas la ĉefa.



Ĉirkaŭ 1900 Eschweiler plimoderniĝis per nova kvartalo sude de la Inde kun ekzemple la unua ban- kaj duŝejo en la Aĝena regiono.

Sed ne pensu, ke hodiaŭ Eschweiler estas nur urbo de industriruinoj aŭ malmoderaj domoj. Ekde 1970 ĝi moderniĝis per ti butikuma kaj vidinda urbo kun piedirantaj zonoj, ampleksaj stratoj, nova firejo, nova urbdomo, glitkurejo ktp kt. Krome Eschweiler estas granda karnavalurbo. Rozlunde ĉiujare okasas unu el la plej egaj karnavalprocesioj, 1983 ĝi estis la kvara el la plej grandaj de Germanio kun 75000 spektantoj kaj spektantinoj.

Venu la 5an de majo, venu kaj spertu. La urbo ĉe la Inde kore invitas vin.



SEITE 6
DEUTSCHSPRACHIG

ESCHWEILER INVITAS

ĉu vi interesigas pri atomenergio?
ĉu vi volas bone manĝi?
ĉu vi deziras amuziĝi?



Ĉion tian vi havos, se vi ĉeestos nian



TRILANDAN RENKONTIĜON.



Kiam? la 5-an de majo 1984 (Eŭropa Tago)

Kie? en ESCHWEILER - WEISWEILER

PROGRAMO

- 9³⁰h Akceptejo en la festhalo Festhalle Weisweiler
Berliner Ring, Telefono (02403) 65133.

Renkontiĝo en la ĉefa enirejo de la elektrofarejo RWE Kraftwerk
Werkstraße.

Gvidado tra tiu ĉi centralo.

Tagmanĝo en la supre indikita festhalo.

Laborkunsido ĉe kafo kaj kuko LAŬVOLE.

Poste ni depende de la vetero vizitos la urbon Eschweiler.

Saluto far nia alta protektanto de la urbo Eschweiler.

Prelego de S-ro Christian Darbellay pri "Atomenergio kaj ĝiaj alter-
nativoj" kun posta diskutado.

Distra vespero. Kantoj, popolaj dancoj, tombolo, muziko kaj ludoj.

KAJ intertempe abunda vespermanĝo ĉirkaŭ la 18a horo.

vojon al la festhalo vi facile trovos per la mapeto sur paĝo 4. En kazo de
ruĝo vi trovos la vojon tuj al la elektrofarejo aŭ per la mapeto sur paĝo
per la priskribo interparenteza supre de la mapeto.

= Rheinisch-Westfälische Elektrizitätswerke

= Rejnland - Vestfaliaj Elektrofarejoj)



NOTU:

ĈI VI HAVOS POR
MALALTEGA SUMO DE

- gm pojunul(in)e

- gm popersone

- gm pogeedze

ALIGI - ADRESO:

Edes Moritz

Eiserfeld 44

L. 02403 / 66888

ESCHWEILER 16

ESCHWEILER INVITAS !

ALIĜILO

POR LA 3LR 1984

nomo(j)

strato

urbo kun poŝta kodo

dato kun subskribo

ĉu vi deziras

vespermanĝi ?
jes ne

ĉu vi volas kunlabori en
nia distra vespero ?

jes ne


SE VI VENOS PER AŬTO

Eblo 1: Venante de la limtransirejo "AACHEN - LICHTENBUSCH" :

Uzu la aŭtovojon A4/E5 tra "AUTOBAHNKREUZ AACHEN" (aŭtovoja kruco) la direkto "KÖLN , ESCHWEILER".
 Preterpasu la ŝildon "ESCHWEILER" sen eliri.
 Uzu la sekvantan elirejon "ESCHWEILER - WEISWEILER".
 Veturu tuj maldekstren vojon da 700 m kaj denove maldekstren en la straton "Werkstraße", kie troviĝas blanka ŝildeto "RWE Kraftwerk".
 Ĝis la ĉefa enirejo de la centralo estas krome vojo da 800 m.

Eblo 2: Venante de Köln (Kolonjo) :

Uzu la aŭtovojon A4/E5 en la direkto "AACHEN".
 Preterpasu la ŝildon "DÜREN" sen eliri.
 Uzu la sekvantan elirejon "ESCHWEILER - WEISWEILER , INDEN".
 Veturu tuj dekstren kaj post vojo da 100 m maldekstren en la straton "Werkstraße", kie troviĝas blanka ŝildeto "RWE Kraftwerk".
 Ĝis la ĉefa enirejo de la centralo estas krome vojo da 800 m.



VENU, VENU,
 VENU MULTNOMBRE,
 POR KE LA 3LR



ESTOS GRANDEGA
 SUKCESO POR ĈIU !



SE VI VENOS PER BUSO

linio

- 6 Jülich - Eschweiler
- 28 Alsdorf - Eschweiler - Weisweiler
- 52 Aachen - Eschweiler
- 53 Eschweiler ĉefstacidomo - Eschweiler buscentralo
- 94 Jülich - Weisweiler - Eschweiler
- 96 Düren - Weisweiler - Eschweiler



NE FORGESU!
Sabaion, ĉe
5-an de majo!

Depende de la linio eliru ĉe „Frankenplatz“ aŭ ĉe „Weisweiler Spielplatz“.
Ne eliru ĉe „RWE Abzweigung“!

SE VI VENOS PER TRAJNO (LINIO AACHEN - KÖLN)

Vi alvenos ĉe Eschweiler Hauptbahnhof (ĉefstacidomo).

- Eblo 1 : vi iros per la buslinio 53 al Eschweiler Bushof (buscentralo)
pluen per linio 28 al Weisweiler Frankenplatz
- Eblo 2 : rekte per la buslinio 94 al Weisweiler Frankenplatz aŭ Weisweiler
Spielplatz
- Eblo 3 : vi anoncu vin, ke vi venos trajne, je la kioma horo, kaj ni
akceptos vin ĉe la ĉefstacidomo

E S C H W E I L E R

- la urbo en verdaĵoj
- la urbo ĉe la Inde
- la urbo inter nova kaj olda



KAJ KIEN
MI DEVAS SENDI
LA
ALIGILON
?



LI JA ANKORAŬ NE KOMPRENIS
 Mercedes Moritz
 Im Römerfeld 44
 @ 02403 / 66666
 5180 Eschweiler 16



POR LA PROSPERO DE BONA ESPERO

Tiun ĉi sloganon ankaŭ la ne-esperantistoj konas, kvankam la moto "por la prospero de *Bona Espero*" ne estas tiel aĝa kiel la lerneja bieno mem. La 14-an de julio 1957 kvin brazilaj esperantistoj subskribis kontrakton, eduki socialajn georfojn sur 500 hektaroj da ruro en Goias laŭ la homa digno. Oni konstruis domojn kaj aĉetis pli da ruro; la bieno baldaŭ duobligis. Ĉiam pli kaj pli da gejunuloj havis almenaŭ por kelkaj jaroj helpon kaj gardon.

En Eŭropo kaj eĉ Brazilio nur kelkaj geuloj konis tiun projekton de niaj lingvaj amikoj. Sed tio ŝanĝiĝis per Ursula kaj Guisepe Grattapaglia el Italio, kiuj tre tre entuziasme laboris kaj as tie kaj atentigis en la tuta mondo.

Tiun deziron, forlasi nian supercivilizitan mondon, ni certe ĉiuj iam perceptis. Kia dependa oni estas, ni rimarkas rapide, kiam malestas ĉiuj teknikaj iloj. Aldone ja devas esti la vere firma persistemo kaj konvinko kontinui malgraŭe; nur per jardekdaŭra uzado de ĉiuj fortoj plibonigi la vivkondiĉojn de *Bona Espero*. Novan lernejon junaj geesperantistoj per financa subteno de *Terre des Hommes* konstruis, ĉiuj pontoj estis renovigataj, per persista almozpetado germanaj geesperantistoj atingis, ke *Misereon* financis traktoron.

28 geknaboj nun lernas en *Bona Espero*, kies familioj loĝas en ĉirkaŭ da 80 kilometroj. Tiuj infanoj ne nur lernas skribi kaj legi, ankaŭ la necesan bazon de sana nutrado, higieno, ĝardenlaboro kaj domflegado. Dum la pasintaj jaroj pli ol 200 geknaboj inter 5 kaj 13 jaroj povis frekventi tiun grandiozan lernejon.

Egaj elspezoj baldaŭ atingos tiun ĉi bienon, i.a. oni bezonas novan vetuilon, ĉar la nuna nura, malnova VW-Bulli, baldaŭ disiĝos.

Pro tiuj miscirkonstancoj la 24an de marto 1981 oni fondis la subtenan asocion "*Bona Espero e.V.*" en Telgte. En la estraro estas i.a. Margret Brandenburg, esperantistino, kiu jam prelegis pri *Bona Espero* kiel gastino de Esperantista Rondo la 3an de novembro 1983.

"*Bona Espero e.V.*" estas agnoskita komunprofitdona asocio, kies membro almenaŭ dufoje jare ricevas informilon pri *Bona Espero*. Membroj pagas monatan kotizon da 5,- gm, gesubtenantoj pagas laŭ iliaj eblecoj kaj ricevas kvitancon.

Aliĝilon al S-ino Margret Brandenburg
Brinker Damm 24

D-4404 TELGTE

Bankkonto: Sparda-Bank, Münster (Westf.)
BLZ 400 605 60 kto-n-ro 900 826

BONA ESPERO

Poŝtĉekkonto de la Sparda-Bank:
5732 - 465 Dortmund
por 900 826 BONA ESPERO

Liebe deutschsprachige Nichtesperantisten !

Der "Trilanda Kuriero" (Dreiländerkurier) ist eine fast ausschließlich in Esperanto geschriebene Zeitung.

Die jetzige Ausgabe behandelt, wie Sie vielleicht schon mit Ihren wenigen Esperanto-Sprachkenntnissen herausgefunden haben, schwerpunktmäßig das Dreiländertreffen 1984 in Eschweiler am

5. Mai dieses Jahres. Dies ist ein Treffen, an dem Sie Ihr Esperantowissen auf die Probe stellen oder Erfahrungen und Eindrücke internationaler Beziehungen sammeln können. Wir laden Sie herzlich ein und helfen Ihnen bei auftretenden Schwierigkeiten gerne. Da Sie sich für die übernationale Sprache Esperanto interessieren, aber sie weniger als Ihnen lieb ist beherrschen, haben wir uns gedacht, Ihnen etwas unter die Arme zu greifen.



Schreiben Sie an uns in Deutsch, wir werden auch deutsche Beiträge im Kurier abdrucken, wir übersetzen Ihnen gerne Schriftstücke, wir können Ihnen Lernhilfen und Bücher empfehlen.

Unsere Treffen (siehe auch Seite 1) finden stets donnerstags um 19.30 Uhr in der Jugendherberge Kalverbenden in Aachen-Burtscheid statt, gut mit Kfz oder öffentlichen Verkehrsmitteln zu erreichen. 1984 treffen wir uns dort an folgenden Tagen: 5.4., 7.6., 6.9., 4.10., 5.11. und 6.12.1984.

Auch darüber hinaus lassen sich nach Absprache Treffen einrichten. Wir freuen uns auf Sie.

Esperantista Rondo Aachen
Esperantisten-Runde Aachen

A. Uebags, Karl-Marx-Allee 172
5100 AACHEN, Ruf 0241/65568

W. Bienen, Eynattener Straße 56
5100 AACHEN, Ruf 0241/62350

C. Günkel, Moosweg 36
5180 ESCHWEILER, Ruf 02403/28951